

BRAZILA ESPERANTISTO

52-A JARO

APRILIO-JUNIO 1958

N.º 529-531

HUGO STEINER



Nask. 26 febr. 1878, en Betz. Fervoja ĉefinspektoro pens. Kortega konsilisto (pro eksterlanda propagando por Aŭstrujo pere de Esperanto). Gvidis pli ol 70 E-kursojn. Honora membro de UEA. La bildo montras H. S. stare ĉe ĉambro de la Internacia Esperanto-Muzeo (Vieno), kies fondinto kaj gvidanto li estas.

(Vidu ankaŭ paĝon 7)

APRILIO - JUNIO 1958

52-a Jaro

N.º 529 - 531

BRAZILA ESPERANTISTO

(«O Esperantista Brasileiro»)

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGOSocieto de publika utileco, laŭ registara
dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921
Direktoro:**A. CAETANO COUTINHO**Respondeca redaktoro (redactor
principal):**D-ro CARLOS DOMINGUES**

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 1.º

Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo
de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Senpaga por anoj de B. E. L.
Eksterlande: unu dolaro aŭ 15
respondkuponoj**QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA
BRASILEIRA DE ESPERANTO
1956**(De acordo com os Estatutos todos os membros
são automaticamente filiados à organização
mundial)

	Cr\$
Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o "Brazila Esperantisto"	100,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	250,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	400,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	600,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante	3.000,00
Membro Vitalicio: recebe o mesmo que o Membro Assnante	8.000,00

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.º**

Rio de Janeiro, DF.

**Oni Solene Festis la Naskotagon
de Zamenhof en la Stato
Minas Gerais***Esperanto-Monumento estas donacita
al la urbo Belo Horizonte en la Tago
de la Esperantista Libro*

Esperanto-Monumenton oni inaŭguris je la pasinta 15-a de Decembro en Belo Horizonte, ĉefurbo de la brazila ŝtato Minas Gerais. Ĝi estas obelisko el marmoro starigita en la placo Esperanto. La tieaj esperantistoj ĝin donacis al la urbo Belo Horizonte okaze de ĝia 60-a datreveno. Cetere en la sama urbo staras ali monumento kun Zamenhof-busto el bronzo inaŭgurita la 17-an de Decembro, 1950.

Antaŭ pli ol ducent kvindek gesamideanoj, krom oficialaj invititoj kaj simpatiantoj, parolis d-ro Carlos Resende, prezidanto de la «Mineira» Esperan-

to-Societo. Lia parolado reliefigis la gravecon de la Internacia Lingvo kaj enhavis poeziaĵojn de Zamenhof, per kiuj li evidentigis la belecon de nia interkomprenilo.

Post la inaŭguro de la Monumento antaŭe kovrita per Esperanta Flago prenis la parolon d-ro Américo Cyrillo, kiu reprezentis la Urbestron, d-ro Celso Azevedo, kaj ankaŭ d-ro Antônio Augusto Melo Cançado, direktoro de la Kulturfako de la Urbestro kaj katedra profesoro de la Katolika Universitato. En la nomo de Universala Esperanto-Asocio parolis la delegito d-ro Luís de Azeredo Coutinho, kiu interalie salutis la Tagon de la Homaj Rajtoj.

Esperanto-Societo de Minas Gerais omaĝe al la Tago de la Esperantista Libro disdonis la lastan numeron de sia oficiala organo, nome *Esperanto Triumfanta*, kaj d-ro Meló Cançado regalis la ĉeestantojn per plaĉa festo en sia hejmo.

BRAZILA ESPERANTISTO

52-A JARO

APRILIO-JUNIO 1958

N.º 529-531

ĈU NI PROGRESAS ?

Ĉiun fojon, kiam la bruo en nia afero iom trankviliĝas, kiam pasas kelka tempo sen novaj videblaj faktoj, ni ricevas de kelkaj amikoj la demandon: «ĉu nia afero progresas aŭ ĉu ĝi haltis?» Kelkaj el niaj amikoj pensas, ke afero progresas nur tiam, kiam ĝi bruas; tial la humoro kaj opinio de tiuj ĉi amikoj kun ĉiu tago alie ŝanceliĝas: kiam ili trovas en nia gazeto multajn konsolajn novaĵojn, ili ekkrias: «vivu Esperanto! ni iras, ni venos, ni atingos baldaŭ la celon!» kiam pasas kelka tempo sen novaj aperoj, tiuj ĉi amikoj venas al la konvinko, ke ni staras sur unu loko aŭ ke ni eĉ mortas — kaj ili perdas la kuraĝon kaj lasas fali la manojn. Tamen egale senkaŭzaj estas la tro granda ĝojo en la unua okazo, kiel ankaŭ la malĝojo en la dua.

Ni iras antaŭen regule. La celo lumas al ni ĉiam tiu sama, kaj, ĉu hodiaŭ la cirkonstancoj estas pli favoraj, morgaŭ — malpli kaj postmorgaŭ denove pli — la veraj amikoj de nia ideo laboras trankvile kaj kun egala animo. De flanka bruo kaj de ekstera ŝajno neniel dependas la sorto de nia afero.

Ni devas brui, kiom ni povas, ni devas peni, kiom ni povas, krei ĉiam novajn faktojn por la okulo, ĉar... la blinda amaso tion ĉi amas kaj povas esti altirata la plej bone per tia maniero (la fakto, ke ni bedaŭrinde ne

havas ankoraŭ la eblon, por sufiĉe brui kaj fari reklamon, multe malhelpas al ni en la altiro de la amasoj); sed por ni mem tiu ĉi bruo aŭ silento ne povas esti mezurilo de nia progresado aŭ starado. Plej granda bruo kaj ekstera brilo povas kovri sub si objekton, regule kaj energie kreskantan kaj disvolviĝantan. Ni lasu al la amasoj, taksi la aperojn laŭ ilia ekstera brilo; se la amaso nun adoras ian luman meteoron, nenio ĝin detenos post kelkaj minutoj tute forgesi pri la meteoro, kiam tiu ĉi perdos sian malveran lumegon; se la amaso hodiaŭ silente rigardas aferon, malrapide sed konstante disvolviĝantan, tiu ĉi ne detenos la amason morgaŭ aliĝi al la afero nerimarkite kaj tiri el ĝi utilon. Ni lasu al la amasoj juĝi la faktojn laŭ ilia ŝajno; kiam ni mem volas scii, ĉu nia afero progresas aŭ ne, ni devas esplori la faktojn internajn.

Se venos iam la tempo, kiam la tuta mondo scios kaj uzos la lingvon Esperanto, tiam — neniu dubos — ni povos kuraĝe diri, ke nia afero absolute atingis la celon. Ju pli multe da homoj ekscias kaj ekuzas nian lingvon, des pli multe ni proksimiĝas al nia celo, des pli multe ni progresas. Sekve la sola efektive vera montro, ĉu ni progresas aŭ ne — estas la kreskado aŭ nekreskado de la nombro de esperantistoj. Ĉio alia estas nur rimedoj, sed ne faktoj.

Se eĉ la tuta mondo bruos pri nia afero, se nia afero brilos en ĉiuj publikaj lokoj, sur ĉiuj ekspozicioj de la mondo k.t.p., sed la nombro de la personoj kiuj ellernas kaj uzas nian lingvon ne kreskos — tiam ni malgraŭ la ŝajna potenco devos diri, ke nia afero mortis, ke ĝia lumo baldaŭ estingiĝos, kiel la lumo de minuta meteoro: sed se eĉ la tuta mondo silentos, se ĉiuj obstine kovros antaŭ ni la okulojn kaj la orelojn, se nia afero longe ankoraŭ restos tute nekonata en la plej granda parto de la mondo, sed se la nombro de la esperantistoj regule, se eĉ malrapide restados, — ni povos kuraĝe diri, ke ni regule progresas, ke ni regule iras antaŭen kaj ke la estonteco apartenas al ni.

Se vi deziras scii la staton de nia afero, ne serĉu en nia gazeto en la rubriko «Nia Afero», kiu prezentas eksterajn; serĉu en la rubriko «Novaj Esperantistoj», kiu estas la plej grava rubriko de nia tuta gazeto. Tiu ĉi rubriko estas ankoraŭ malgranda, sed ĝi estas konstanta, ĉiu numero de nia gazeto alportas regule novan serion da novaj esperantistoj, kaj tio ĉi donas al ni la plej bonan garantion por la estonteco, tiu ĉi montras la plej klare, ke ni regule progresas. Se ĉiu amiko penos alportadi ĉiam novajn ŝtonetojn al la konstruo de tiu ĉi rubriko, ĝi kreskados pli kaj pli, eliros el la kadroj de nia malgranda gazeto kaj fariĝos iom post iom potenca memstara organo kun centoj kaj miloj da novaj nomoj en ĉiu numero. Ju pli riĉa estos la dirita rubriko, des pli grandaj fariĝos niaj fortoj kaj des pli bone iros jam per si mem ankaŭ ĉiuj aliaj flankoj de nia afero. Kaj kiam fine la numeroj en tiu ĉi rubriko atingos potencon altecon kaj la kolektitaj

nomoj prezentos tute grandan popolon, tiam ni povas ĝoje gratuli al ni, ke ni sen bruo venkis la mondon. Kaj tiu tempo venos!

L.L. ZAMENHOF

El «La Esperantisto», 1892, N.^o 65
— Paĝo 157 de «Originala Verkaro».

Zamenhof-Monumento en Wien

La 27-an de julio 1958 okazos en Wien la inaŭguro de inda ZAMENHOF-MONUMENTO, la unua tia en la ĉefurbo de iu ŝtato. La necesa mono alfluas bone kaj ĉiu, kiu deziras kontribui sian obolon, povas tion fari, sendante aŭ resp. kuponojn aŭ bankbiletojn (dolaroj, funtoj, guldenoj, svis. kaj fr. frankoj, Dmarkoj, liroj, danaj norvegaj kaj svedaj kronoj) en letero aŭ per ĉeko, kio estas pli multekosta. Multaj sendis la obolon en leteroj. Kiu sendos almenaŭ 5 r.k. aŭ egalvaloron ricevos monument-foton kun la okaza Esperanto-poŝtstampo. Kiu donacos pli, estos ankaŭ eternigata sur la dokumento, enmurigota en la soklo de la monumento.

Niaj samideanoj la urbestro de Wien Franz Jonas kaj em. ministro kaj nuna prezidanto de Kalkulkontrollejo Ing. Dro. doc. Hans Frenkel eniris la Honor-Komitaton.

Adreso: Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (Monumenta Komitato), Wien I. Hofburg, Aŭstrio.

43.^a Universala Kongreso de Esperanto

2-9 Aŭgusto 1958

Mainz — Germanujo

La nuna konstruata Sporta Palaco de la Universitato, la plej granda kaj moderna konstruaĵo de Mainz, estos la Inaŭgurejo de la 43-a Universala Kongreso de Esperanto.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista kaj Kristana Esperantista Ligo Internacia okazigos dum la Kongreso la koncernajn diservojn.

Anoncas fakkunvenojn:

- Akademio de Esperanto, Wassenaarseweg 11 C, Den Haag.
- La Esperanto-Spiritista Societo, 38 Fil-lebrook Road, London E. 1- pri: "Eksperimentoj en psika esploro".
- Internacio de Militrezistantoj, S-ro G. Tucker, Birchcroft, Pilgrims' Way, Harbledown, Cantebury, Britujo.
- Kristana Esperantista Ligo Internacia, D. de Boer, Druivenstraat 32, Den Haag, pri: "Nacia kaj internacia politiko en la lumo de la Evangelio". — Por festi la oran Jubileon de UEA okazos dum la Kongreso komuna bankedo. Kotizo: 10 germ. markoj. — Por gejunuloj ĝis 25 jaroj okazos Oratora Konkurso pri "Juna kaj pliĝa generacioj". La premioj disponigitaj de L.K.K. kaj de U.E.A. konsistas el:

1. stipendio de 70 markoj por partopreni en internacia esperantista aranĝo.
2. Esperanto-libroj ĝis 50 markoj.
3. Esperanto-libroj ĝis 30 markoj.

La juĝkomisiono konsistas el: S-ro H. Bourdelon, veterano, S-ro W. Auld, verkisto, S-ro G. Becker, prezidanto de T.E.J.O. La regularo de la konkurso estas publikigita en la Dua Oficiala Bul-teno. La Internacia Arta Teatro, sub la reĝisorado de S-ro Sdrjan Flego, interkonsente kun L.K.K. prezentos en Mainz, krom "Fantomoj" de Ibsen, ankaŭ alian teatran ludon, sub la titolo "Nova Commedia dell' Arte". La tea-

trajo, kiu okazos sabaton 9 aŭgusto post la fermo de la Kongreso, estas rezervita al la kongresanoj, kiuj anticipe abonos ĝin ĉe la Kongreso. Enirkosto: 5 germ. markoj.

La Estraro de U.E.A. decidis, ke la Kongreso laboru en du sekcioj. La unua pritraktos: "Reciproka aprezo de okcidenta kaj orienta kulturaj valoroj. La rolo de la Internacia Lingvo" (Prezidanto: Prof. Yagi — Japanujo; Ĉefraportanto: Prof. Lapenna — Britujo). La Dua pritraktos: "La lokaj socioj — kerno de nia Movado" (Prezidanto: D-ro Hermann — Germanujo — Raportanto: S-ro Strönne-Svedujo). Statistikoj ĝis la fino de marto: 1447 el 33 landoj.

III CONVENÇÃO MINEIRA DE ESPERANTO

CARATINGA, 10-13 DE JULHO DE 1958

Desenvolvem-se com entusiasmo e atividade os preparativos da III Convenção Mineira de Esperanto, que, segundo tudo indica, alcançará brilho semelhante aos das antecedentes, já realizadas em Belo Horizonte e em Barbacena.

A Comissão Organizadora, que se vem esforçando com dedicação e competência no cumprimento da sua árdua tarefa obteve o apoio das autoridades locais que mostram vivo interesse pela Convenção, bem avaliando a importância que terá para a região.

Não só de Minas Gerais mas de vários outros pontos do país, chegam muitas adesões, sendo de esperar o comparecimento de grande número de aderentes.

A Comissão brindará os congressistas com belas lembranças de Caratinga.

As adesões podem ser feitas diretamente à Comissão Organizadora ou por intermédio da Liga Brasileira de Esperanto.



Brazila Kroniko

BAHIA

Salvador — Associação Esperantista de Bahia feste memorigis la 21-jaran datrevenon de la fondo de la asocio (komence kiel grupo) Ĝi daŭrigas la organizon de E.-kursoj sub la direkto de niaj agemaj samideanoj Onias de Almeida, Godofredo Goes kaj Leopoldo H. Knoedt.

MINAS GERAIS

Ubá — Ĝuante feriojn en ĉi tiu urbo, nia samideano Maurício Monken Gomes profitis ĝin belmaniere: gvidante elementan E.-kurson al 25 gelernantoj.

STATO RIO DE JANEIRO

Volta Redonda — Nova elementa kurso funkcias en ĉi tiu industria urbo, sub la direkto ne nia samideano inĝ. Alberto Flores. Li ankaŭ organizis ĉe montra fenestro de la magazeno de S.E.S.I. (Serviço Social da Indústria) ekspozicieton de Esperantaĵoj.

Niteroi — Niteroi Esperanto-Klubo aklamis sian novan prezidanton, nia entuziasma samideano Joaquim do Couto.

SÃO PAULO

Votuporanga — Votuporanga Esperanto-Klubo estas nun direktata de nia samideano Joaquim Alves de Figueiredo.

PARANÁ

Curitiba — Nia samideano Augusto C. Castro gvidas E-kurson ĉe la Teozofia Societo. Ties anoj interesiĝis pri nia lingvo pere de vizitoj kaj propagando de nia fervora samideanino Yolanda de Araújo Costa, kiu promesis doni premiojn al la lernantoj de E-kurso.

SANTA CATARINA

Blumenau — Junulargrupo komencis Esperanto-movadon, sub la gvido de nia samideano Carlos Geiser. Ĝi intencas organizi E.-ekspozicion kaj petas ĉion utilan por tiu celo. Adreso: Esperanta Movado, Blumenau, Santa Catarina, Brazilo.

RIO GRANDE DO SUL

Pelotas — La nova prezidanto de Esperanta Societo de Pelotas estas S-ro Dario Soares, delegito de U. E. A.

RIO DE JANEIRO (D. FEDERAL)

Kosmos Country Club (Vila Jardim da Penha, av. Meriti 1.601) feste inaŭguris novan elementan E-kurson, sub la direkto de nia samideano Bianor Collect de Araujo. Dankon pro la invito!

Ĉe la sidejo de la klubo «Liberdade Independentes Clubes Associados», en Realengo, niaj samideanoj Alfredo Moreira Agra kaj Edison Carlos de Souza faras elementan E-kurson.

HUGO STEINER 80-JARA

La aŭstria Esperanto-Pioniro Kortega Konsilisto Hugo Steiner fariĝis 80-jara la 26-an de februaro 1958. Li esperantistiĝis en 1911 kaj en 1912 partoprenis sian unuan Universalan Kongreson, en Krakovo. En 1924 li komencis agadi por Esperanto kaj de tiam dediĉis sin tute al ĝi.

Jen kelkaj datoj:

- 1924 — li fondis kaj eldonis la gazeton *Aŭstria Esperantisto*.
- 1926 — li fariĝis prezidanto de «Aŭstria Esperanto-Asocio».
- 1926 — (ĝis 1934) membro de la Komitato de U. E. A.
- 1927 — fondo de Internacia Esperanto-Muzeo (I. E. M. W.).
- 1928 — Steiner faris kontrakton kun Ministerio de Edukado, per kiu IEMW por eternaj tempoj estis aligata al la mondfama Aŭstria Nacia Biblioteko kiel memstara «Specialkolekto». La ŝtato devigis sin senpage doni la necesajn ejojn, bindigon de la libroj, hejtadon, lumigadon kaj la necesan kancelarimaterialon.
- 1933 — UK en Köln distingis lin kiel «Honora Membro de UEA».
- 1935 — li estis distingata de la Aŭstria Registaro per la titolo «Kortega Konsilisto».
- 1936 — li aranĝis kaj prezidis la 28-an UK en Vieno.
- 1945 — post la milito li denove reorganizis la Muzeon, kiun la Gestapo fermis en 1938, deponinte la materialon en kelo de Hofburg. Per helpo de Kanceliero D-ro Figl li ricevis 5 salonegojn en Hofburg.

- 1946 — li ekeldonis la «Informilon de IEMW».
 - 1951 — li inaŭguris la Panteonon de la Esperanto-movado en IEMW kaj aranĝis konstantan Ekspozicion.
 - 1954 — la Aŭstria Ŝtatprezidanto D-ro Theodor Körner distingis lin per la «Ora honorinsigno pro meritoj je la Respubliko Aŭstrio».
 - 1957 — li verkis kaj eldonis la Katalogon pri la Esperanto-kolektoj de IEMW, 461-paĝa, kaj 1958 sekvas la 2-a parto pri la «Sistemoj kaj provoj de mondhelplingvo».
- Steiner verkis 2 lernolibrojn kaj diversajn broŝurojn. Li sukcesis, ke la ŝtato ankaŭ kreis specialan postenon por gvidanto de IEMW, kiu — kiam Steiner ne plu kapablas kaj povas gvidi la Muzeon — transprenu la agadon kaj gvidadon de IEMW. La nova helpanto estas juna doktoro, esperantisto; li apartenos al la oficistaro de Nacia Biblioteko kaj estos pagata de la ŝtato.
- 1924 — li pensiigis por dediĉi sian vivon al Esperanto.

Gratulon al tiu modela esperantisto!

NEKROLOGO

THEODOR CEJKA

La februara «Bulteno de Esperantista Klubo ĉe Osvetova Beseda en Praha», Ĉeĥoslovakio, sciigis pri la morto de la klera, fervora esperantisto Theodor R. Ĉejka, instruisto, la inicia-

tinto de la Esperanto-movado inter la Ĉeĥoj.

Li naskiĝis la 10-an de januaro 1878 en Bystricĉe pod Hostynem, kaj en tiu moravia urbeto li loĝis la tutan vivon, ĝis lia morto la 26-an de novembro 1957.

Th. Ĉejka verkis kaj eldonis proprariske la unuajn ĉeĥajn lernolibrojn en 1900 kaj vortaron Esp-ĉeĥan en 1908. Li fondis la bonegan monatan gazeton «Revuo Internacia», redaktitan pure en Esperanto, kaj la gazeton «Bohema Esperantisto».

PAUL NYLÉN

Forpasis, la 14-an de januaro 1958, Axel Paul Nylén, la nestoro de la sveda esperantistaro.

Nylén naskiĝis la 20-an de junio 1870 en Tillinge (apud Enköping). Li fariĝis esperantisto en somero de la jaro 1892. La «Adresaro de Esperantistoj» serio XII (de 1-11-1892 ĝis 1-1-1893) entenas, sub n-ro 2.255: «Nylén, A. P. studento. Gierdtop, Helles-tad, Svedujo».

En 1893 li jam abonis la gazeton *La Esperantisto* kaj aniĝis al la Klubo Esperantista en Upsala. En 1897 li estis redaktoro de la gazeto *Lingvo Internacia*, ĝis 1901. En 1905 li partoprenis la unuan Universalan Kongreson de Esperanto, en Boulogne-sur-Mer, kaj poste aliajn ĝis tiu de Bologna (Italujo) en 1955. Li studis ĉe la Universitato de Upsala. Kunlaboranto de la Enciklopedio de Esperanto. Jurnalisto, li estis redaktoro de *Stockholms Tidningen* kaj de *La Espero*. De 1905, membro de la Lingvo Komitato kaj de 1908, de la Akademio de Esperanto. Li estis prezidanto de la Sveda Esperanto-Federacio kaj de la Grupo Esperantista de

Stockholm. Kuntradukinto de la tragedio «Fraŭlino Julie», de Strindberg, li verkis plurajn broŝurojn propagandajn, kaj la ŝatatan vortaron Esperanto-svedan.

«Se iu meritas la nomon de vera esperantisto, tiun titolon meritas Nylén («Adolf Larson, 1930). Sub la portreto de Paul Nylén, kiu malfermas la librofilmon» 50 jarojn kun Paul Nylén (1942), oni legas:

«Nur amo povas krei vivon. Esperanto fariĝis vivanta lingvo per la amo de ĝiaj uzantoj.»

(Bibliografio — de paĝo 18)

Ekde januaro 1957 regule aperas tiu revuo en Esperanto. Ĝi prezentas la landon antaŭ la tutmonda esperantistaro, konatigas la mondon kun la akiraĵoj kaj sukcesoj ĉe la kontruado de la socialismo en Bulgarujo. Belegaj bildoj, bonega legado.

En ombro kaj en lumo — Zilda Gama. Novelo mediume skribita en la portugala lingvo, de la spirito de Victor Hugo Esperantigis L. C. Porto Carreiro Neto. 274 p. 1957. Eldonfako de la Federação E. Brasileira. Av. Passos, 30, Rio de Janeiro.

Tre interesa mediuma verko, antaŭ multaj jaroj jam publikigita en portugala lingvo, kaj nun en la unua eldono en Esperanto. Pro la tradukinto, estas nebezzone diri, pri la traduko, ke la lingvo estas perfekte Zamenhofa. Ankaŭ la eldonajo estas bonega, kaj la revisio sen mankoj.

Grajnoj en Vento — (Tutmondaj interlernejaj rondoj). Celo: krei reton de infanan rondon sur la tuta terglobo: pruvĵi la taŭgecon de Esperanto por interrilatoj de tutmondaj gelernantoj; enkonduki Esperanton en la lernejojn; labori per la infanoj por la internacia kunlaboro.

Subtenantaj membroj: 7 frankoj poĵare. La septembra numero enhavas la foton de la nepo de D-ro Zamenhof, parolanta antaŭ la urbestrado de Arles (Franĵujo). Adreso: rue des Pins, 66, Bienne — Biel 7 — Suisse (Svisujo).



O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO



ALEMANHA — Terá lugar de 26 de julho a 2 de agosto a 14-a a Internacia Junular-Kunveno de TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) em Homburg-Saar.

— A gazeta *Magasin der Hausfrau*, de Munique, em sua edição de 5 de janeiro insere uma nota, na qual diz que, além do Esperanto, existem mais 400 outros projetos de línguas auxiliares artificiais.

Mas, concluímos, só o Esperanto, que não é mais projeto, conseguiu vencer e ser usado, estudado, publicado, com riquíssima literatura, em todo o mundo.

AUSTRIA — O 27.º Congresso de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) está marcado para 26 a 31 de julho, em Viena.

HOLANDA — O Congresso Esperantista (Labor-Kongreso) de Flandra Ligo Esperantista (F.L.E.) foi realizado a 29-30 de março, na atraente cidade Aalsmeer.

HUNGRIA — Comemorando o 70.º aniversário do Esperanto foram emitidos dois selos postais, dedicados ao Esperanto e ao D-ro L. Zamenhof, contendo textos em Esperanto e em húngaro.

ITALIA — A Municipalidade da cidade de Pisticci (província de Matera) inaugurou uma rua com a denominação **ESPERANTO**.

URUGUAI — Na histórica cidade de Colonia (região do rio da Prata) reuniram-se nos dias 12 e 13 de outubro de 1957, 50 esperantistas uruguaios e argentinos, para tratar de diversos problemas referentes ao movimento. Após animados debates, trocas de idéias, sugestões, chegaram a acôrdo sobre vários assuntos, dentre êles ficando decidido o seguinte:

Aceitar a sugestão para realizar-se um Congresso Americano de Esperanto (Tutamerika Kongreso de Esperanto) no inver-

no de 1959, no Rio de Janeiro, declarando que as organizações apresentadas contribuirão, na medida do possível, para a propaganda nos países hispano-americanos.

(*Boletín Uruguayo de Esperanto*, Out-Dez. — 1957).

Edifício Esperanto

Pro simpatio al nia afero, jen la nomo donita al serio da kvin teretaĝaj apartamentoj, kiun ĵus konstruigis en Maceió, ĉefurbo de la ŝtato Alagoas, f-ino Nirva de Amorim Santiago, filino de nia malnova amiko, samideano Paulino Santiago.

La nomo «Edifício Esperanto» estas surmetita sur la pli videbla parto de ĝia fasado.

LETERO AL B. E.

Antverpeno, 7-10-57

Estimata Sinjoro,

Kun granda plezuro mi sciigas al vi ke mi ricevis bone la ekzemplerojn de *Brazila Esperantisto*, por kiuj mi devas esprimi mian kamaradecan dankon. Mi devas diri, ke via Esperanta organo estas unu el la plej interesaj, kiujn mi iam legis.

Fratajn salutojn.

PETRO GILLANDE

Antverpeno — Belgujo

Dezirás korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj, interŝanĝi poŝtmarkojn, gazonojn kaj poŝtkartojn, kvanto kontraŭ kvanto. Certe respondos! Ludvik Zeleny, Havličkuv Brod, Hulakovského ul. 716, Ĉeĥoslovakujo.

? LA MISTERO

ROMANO

Afrânio Peixoto, Coelho Neto, Medeiros e Albuquerque, Viriato Correia

XXXII

EN BAIA

Leonor komprenis sian situacion. Ŝi estis tute perdita. Antaŭ kelkaj tagoj Sanches Lobo estis malvirgiginta ŝin.

Ĉe la mondumo oni ĉiam sukcesas estingi la meĉon de la tuj eksplodonta skandalo.

Leonor estis tiel ruza, ke ŝi konvinkis sian intiman rondon pri tio, ke ŝi rompis ĉiujn rilatojn kun Sanches Lobo kaj ke ŝi estis fariĝinta lia fianĉino pro nura malpaceto kun la kuzo. Ludoviko Albergaria havis malfortan karakteron kaj estis infanece naiva.

Post tri tagoj ili renkontiĝis en granda halo en la palaco de la ŝtatestro. La rilatoj estis denove starigitaj kaj la edziĝfesto estis anoncita por baldaŭa tago.

Fakte, post unu monato ili geedziĝis.

Ĝi estiĝis doloro por Albergaria. En la morgaŭo de la edziĝo li ne estis plu la bela kaj feliĉa junulo, kiel antaŭe, sed senespera kaj malgaja homo. Li plene konsciis pri la malfeliĉo de sia situacio.

Lia unua impulso estis forlasi Leonoron, malsekretigi sian senhonorigon, ĝin dissciigi, rompi. La skandalo estus grandega. La mondumo de Recife malbonfamigus lian nomon kaj ŝian.

Albergaria estis produkto de la sociaj decreguloj de la medio, en kiu li estis naskiĝinta. Tiuj decreguloj devigis lin silenti. Li silentis. Sed inter li kaj la edzino la vivo fariĝis vera infero. Ambaŭ junaj, ambaŭ plenaj de revoj kaj sin reciproke amantaj, ili estis geedzoj nur antaŭ la okuloj de la mondo. Interne de la domo, ne estis pli granda amareco, ol tiu de iliaj koroj.

Ili loĝis en apartaj ĉambroj kaj neniam paroladis unu al la alia escepte eks-

ter la domo, pro sklaveco al la sociaj antaŭjuĝoj.

La brilega juneco de Leonor videble finiĝis, la juneco de Albergaria, en la mirinda forto de dudek kvin jaroj, kvazaŭ estingiĝis.

Tiu junulo, kiu sin montris en la fest-salonoj kaj estis tiel amata kaj dezirata de la junulinoj, kiu estis tiel ĉarme bon-educita kaj havis tiel belan inteligentecon, komencis devojiĝi en kompatinda maniero.

Li komencis drinki. Kuracisto, kun enviinda klientaro, li sin prezentadis ĉe la malsanuloj en terura ebrieco.

Kelkajn monatojn post la geedziĝo naskiĝis la filo de Leonor. La sociaj decreguloj devigis Albergarian registri lin kiel filon de la edza paro.

Sed la ĉeesto de la infano pli influis sur la falon de la kompatinda kuracisto. Ĉie Albergaria sin prezentis ebriigita. Li komencis havi amorantinojn, la plej malfaltajn, la plej malŝatindajn, fari skandalojn ĝuste sur la strato kun la plej malĉastaj virinoj.

La morala falo havis kiel konsekvencon la korpan falon. Li montriĝis malzorgema, kun makulita kaj malbonodora kolumo, en la plej videbla malpureco de la vesto.

Tiu situacio faris al Leonor grandegan malfeliĉon. Ŝi konvinkiĝis, ke ŝi estas la kaŭzo de la maltrankviliga dekadenco de la edzo. Kaj tio skuis al ŝi la animon en profunda ŝanĝo. Ŝi, kiu preskaŭ ne amis lin, komencis lin ami forte, kun miksitaj honto kaj kompato. La malamo al Sanches Lobo eksplodis en ŝia koro freneze. Ŝi pasigis la tagojn konstante remaĉante planojn de venĝo, afliktegita kaj malgaja, kiel kompatindulino, kiu ne trovas helpon al sia malfeliĉo.

Tiu stato ne povis daŭri. La skandaloj, kiujn Albergaria faris en Recife, lia lando, la lando de la amikoj de lia familio, nepre devis finiĝi.

La amikoj ja konvinkis la kompatindan junulon, ke li translokiĝu al alia urbo.

Li translokiĝis al Baía kun la edzino kaj la infano.

Tie ŝajnis, ke li levus denove sian bonan famon kaj siajn bonajn morojn. En-

kondukita en la grandan mondon, dum unu jaro li havis brilan vivon kiel kuracisto, kun la plej eleganta kaj plej enspeziga klientaro. Sed tio daŭris nur unu jaro. Albergaria revenis al la drinkemo kaj al la diboĉo.

Tiam ekaperis en Baía, metita en altaj negocoj de kakao tiu abomeninda homo — Sanches Lobo. Li estis la sama riĉegulo, kiel antaŭe en Recife, la sama friponego, kiel en ĉiuj tempoj.

Sur la ĵurnaloj eksplodis tremiga skandalo. Unu nokton, Albergaria estis kondukita por fari operacion ĉe virino el la popolamaso. Kredeble li estis tute ebria. Post tri tagoj la virino mortis, kaj eĉ operaciiloj estis trovitaj en la kadavro. La ekspertizistoj severe akuzis la operaciinton. La diskuto komenciĝis sur la ĵurnaloj. La nomo de Albergaria estis malfamigita. Ĉe la komenco de proceso ĉiuj komprenis, ke ĝi estos la kompleta ruino de la kuracisto. La arestordono estis baldaŭ donota.

Unu nokton, kiam Leonor ploris en sia ĉambro, oni frapis ĉe la pordo. La servistoj troviĝis en la posta parto de la domo. Ŝi mem venis malfermi la pordon. Kaj, kiam ŝi lumigis la ĉambron, ŝi kriegis de teruro. Antaŭ ŝi staris Sanches Lobo.

Li venis sin oferi por savi ŝian edzon. La malfeliĉo estis pli granda ol la malamo al la riĉegulo.

Leonor ne demandis, kiuj estas la rimedoj, kiujn Sanches Lobo havas por savi Albergarian. En tiu situacio iu ajn virino fidus.

La sekvantan tagon la friponego revenis. Sajne li havis kelkan influon sur la aŭtoritatulojn kaj sur la ĵurnalojn — la skandalo malplifortiĝis dum kelkaj tagoj. Tio donis al Leonor impulson al fido.

Kaj Sanches Lobo lerte enŝoviĝis iom post iom. Albergaria, kiu mortis ne sciante, kiu senhonorigis sian edzinon, kredis al la trompisto.

Necesas ĉi tio, necesas tio, kaj la kompatinda kuracisto, pelata de la tumultego de la skandalo, preskaŭ ĉiam ebria, subskribadis ŝuldatestojn kaj ŝuldatestojn favore de Sanches.

La kvietiĝo de la proceso ne daŭris longe. La arestordono kontraŭ Albergaria estis donita.

Sanches Lobo estis plenuminta ĉiujn siajn planojn. La ŝuldatestoj subskribitaj de la kuracisto atingis grandegan sumon.

Leonor sciis nenion. Ok tagojn post la aresto de la kuracisto, Sanches eniris ŝian domon. Li eniris, kiel oni eniras ĉe amorantinon.

La digno de la virino el Pernambuco ribelis. Por la cinikeco de la riĉegulo ne estis ribelo ebla. Li estis veninta por proponi al ŝi denove la koron plenan de amo...

Leonor stariĝis de la seĝo.

— For!

Kun abomeninda trankvileco Sanches invitis ŝin sidiĝi.

— Ne valoras la penon furioziĝi, — li diris. — Mi foriros. Mi petas, ke morgaŭ vi ne plu okupu la domon.

Leonor ne komprenis. Tiam li rakontis pri la ŝuldatestoj, kiuj estis en liaj manoj. Li menciis la sumon.

La kompatinda sinjorino terurriĝis. Dum longa tempo ŝi fiksitis per rigardo la riĉegulon kun infera brilo en la okuloj, senmova, ekstaza, kvazaŭ ŝi tuj freneziĝus, kaj poste, en neatendita ago, ŝi antaŭeniris abrupte enigante la ungojn en lian vizaĝon, halucinite, en tumulta eksplodo.

Kiam la servistoj alkuris, ŝi spiregis sur la planko, malkombiĝinta, kun kuntiritaj manoj disŝirantaj la tapiŝojn.

Sanches Lobo ne estis plu en la ĉambro.

VIRIATO CORREIA. Tradukis K.

Deziras interŝanĝi poŝmarkojn kaj korespondi pri ĉiuj temoj kun brazilaj samideanoj. Angel Moreno Lara, San Blas, 4 — Hispanujo.

Ĉeĥoslovaka studento deziras korespondi kun brazila knabino. Adreso: Viktor Dvorák, Ĉsl. armad^y — 37, Mor. Budejovice, Ĉeĥoslovakujo.

ADRESARO DE ESPERANTISTOJ

III

Sur la paĝo 7 de «Esperantisto» jaro IV, Januaro 1893, oni trovas la sciigon: «Laŭ la deziro de la eldonanto-administrato de nia gazeto (W.H. Trompeter) la rubriko «Novaj Esperantistoj» ne estos plu presata en nia gazeto. Por ke tamen tiu ĉi grava rubriko, kiu montras la mezuron de nia progresado kaj la mezuron de laborado de ĉiu el niaj amikoj, ne tute perdiĝu, L. Zamenhof eldonados mem tiun ĉi rubrikon en formo de apartaj broŝuretoj 4 fojojn en la jaro (en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro) kaj sendados ĝin al ĉiuj dezirantoj por la kosto de 10 centimoj por ekzemplero. La unua numero eliros en la fino de Januaro».

Do, aperis la serio XII — Novaj Esperantistoj (de 1-XI-1892 ĝis 1-I-1893). De n-ro 2.055 ĝis 2.351.

Unu el la novaj esperantistoj estis — A. P. Nylén, studento, Gierdtrap, Hellestad, Svedujo, n-ro 2.255. Nia eminenta pioniro Paul Nylén, kiu 87-jaraĝa mortis la 14-an de Januaro laboris ĉiam por Esperanto kaj multon verkis. Aliaj:

N-ro 2.066 — A. M. Arnold, Odesa, Rusujo.

N-ro 2.105, A. Burenkov, Rusujo — Trad. «Unua brandfaristo» komedio de L. N. Tolstoj.

N-ro 2.120, Edmond d'Eyssautier, Paris, Francujo.

N-ro 2.132, A. Frenkel, Brusilov, Rusujo.

Serio XIII — (Dde 1-I-1893 ĝis 1-IV-1893). De N-ro 2.352 ĝis 2.583.

N-ro 2.465, Svänn Krikortz, stud. med., Svedujo.

N-ro 2.541, A. Semenov, Rusujo.

N-ro 2.558, Arnold Thörn, Kandidat, Böda, Svedujo.

N-ro 2.572, Jozef Wasniewski, Varsovio, Rusujo. Polo, ĵurnalisto, la «apostolo de Esperanto en Polujo». Lia originala novelo «En la brikejo» estis premiita dum la unua E.-Literatura Konkurso de L. I. 1896. Li la unua komencis la tre gravajn vojaĝojn inter-esperantistajn.

Serio XIV — (1-IV-1893 ĝis 1-VII-1893). De n-ro 2.584 ĝis 2.899.

La n-ro 2.624 apartenos al D-ro Manuel Ribeiro da Costa e Almeida, kuracisto en Rezende, Portugalujo. D-ro Costa e Almeida publikigis en 1896 propagandan broŝureton — «Breves noções sôbre a língua internacional Esperanto», kaj en 1898 «Plena lernolibro enhavanta du vortarojn laŭ la franca eldono de S-ro L. de Beaufront (A língua universal Esperanto — Methodo completo comprendendo dois vocabularios segundo a edição francesa de M. L. de Beaufront, traduzido e coordenado por Manuel Ribeiro da Costa e Almeida (medico-cirurgião).

N-ro 2.777, Luiz Antonio Galvão de Moraes Sarmiento, professor oficial, Borba, Portugalujo.

N-ro 2.812, J. Polupanov, Rusujo.

N-ro 2.817, Fedor Aleksejeviĉ Postnikov, ĥorunĵi, Rusujo, milita Inĝeniero en Rusujo, ĝis 1905. Transloĝiĝis al Usono, kie li vivis ĝis sia morto en 1952. Nask. 29 febr. 1872.

La serio XV (de 1-VII-1893 ĝis 1-X-1893), n-roj 2.900 ĝis 3.000 ne es-

tis presita, ne ekzistas en aparta broŝuro.

Serio XVI — Adresaro de Novaj Esperantistoj, kiuj aliĝis de 1-X-1893 ĝis 1-X-1895. N-roj 3.001 ĝis 3.602. La n-roj 3.004, 3.005 kaj 3.006 apartenas al Nicolas Clark, Leon Deck kaj Carlos Serraz, el Santa Fé, Argentino (eble la pioniroj argentinaj).

N-ro 3.021, Rolf Nordenstreng, Finnlando. Kunlaboris «Lingvo Internacia».

N-ro 3.093, Adolf Ebner, kand. med., Germanujo. Fondis grupon en Königsberg.

N-ro 3.099, Jac. M. Vaz-Dias, docento de malnovaj lingvoj kaj matematiko. Amsterdam, Nederlando.

N-ro 3.104, Dr. D. M. Sokolov, Rusujo.

N-ro 3.219, Grafo de Noël, Jalta, Rusujo.

N-ro 3.228, Ivan Ŝirjajev, Jaroslov, Rusujo (Pseŭdonimo: Ivan Malfeliĉulo). Instruisto, pastro vilaĝa; originalaj rakontoj kaj multaj tradukaĵoj. La iniciatinto ĉefredaktoro de «Enciklopedio de Esperanto».

N-ro 3.331, Eugen I. Popov, Redakcio de Posrednik, Moskvo, Rusujo.

N-ro 3.371, Lev. A. Davidoviĉ (Ben David), instruisto, ĵurnalisto, Odessa, Rusujo.

N-ro 3.478, V. F. Stankeviĉ, Staba Kapitano, Rusujo. «El la vivo de Esperantistoj», originala rakonto, 1896.

N-ro 3.496, Vilhelm Vaher, instruisto (aŭtoro de la unua E-lernolibro por estonoj (1893) kaj de Konversacia lernolibro (1930), Rusujo.

N-ro 3.577, Nikolaj A. Kazi-Girej, ingênero, Rusujo. Trad. «Kvar tagoj», «Attalea princeps», de Garŝin.

Serio XVII — Novaj aliĝoj, de 1-X-1895 ĝis 1-I-1897.

N-ro 3.603 ĝis 3.997.

N-ro 3.604, Gustav J. Ramstedt, instruisto en finna liceo Abo, Finnlando. Poste, Univ. profesoro, ambasadoro de F. em Tokio, por Japanujo kaj Ĉinujo. Per sia aŭtoritato kiel lingvisto kaj diplomato multe helpis al la movado ĉe oficialaj rondoj; subtenis E. em Japanujo (Enc. Esp.) Mortis 1950.

N-ro 3.654, Hilda Cederblad, Froberga, Svedujo.

N-ro 3.733, Gabriel Chavet, Louhans, Francujo. En 1897, studento en la gimnazio de Louhans, li tie fondis kun kolegoj la unuan E-klubon fonditan en Francujo. Verkis E. lernolibron, fondis E.-librejon, multe verkis kaj laboris por E.-.

N-ro 3.741, M-lle A. Roux, professeur d'allemand, France.

N-ro 3.744, Hyalmar Bäckstrom, Lulea, Svedujo.

N-ro 3.749, F-ino J. E. Zabilon d'Her, Lyon, France, Professeur d'assimilation pour les enfants sourds-muets.

N-ro 3.790, M. M. Abesgus, Odessa, Rusujo. Originala rakonto «Kraljeviĉ Marko» premiita en la literatura konkurso de 1896.

N-ro 3.794, Vladimir Gernet, Kemiisto kaj privatinstruisto, Odessa Rusujo. Trad. «Fantomoj», de Korolenko, «Pentraĵoj el Vojaĝo», de Heine, la faman leteron de Z. al Borovko.

N-ro 3.821, Gaston Moch, ekskapitano de artilerio, Paris, France. Krom aliaj verkoj, trad. «Angla lingvo sen profesoro» de Tristan Bernard, «La

Reĝo de la Montoj», de Edmond About. Redaktis revuon «Espero Pacifista».

N-ro 3.846, Arno Philipp, redaktoro de «Deutsche Zeitung», Porto Alegre, Brazilo, Altirita de V. Ŝmurlo (Rusujo).

N-ro 3.861, Herman Ŝtalberg, juvelisto, Revel, Rusujo. Kiam li loĝis en Vezenberg, li preparis la unuan arĝentan insignon esperantistan.

N-ro 3.897, Aleksandr Zakrjevskij, Smolensk, Rusujo. Membro efektiva de la S. Peterburga societo «Espero».

Serio XVIII — Novaj aliĝoj de 1-I-1897 ĝis 1-I-1898. N-ro 3.998 ĝis 4.333.

N-ro 4.098, Jácome Martins Baggi de Araújo, juĝisto, Petrópolis, Brazilo.

N-ro 4.278, Felix Bernard Zdanski, Porto Alegre, Brazilo.

A. Caetano Coutinho

(Daŭrigo de la n-oj nov.-dec. 1953 kaj januaro 1957).

KATALOGO DE IEMW

La 1-a parto pri la kolektoj de Esperanto-presaĵoj, 461-paĝa, kun afranko 38 resp. kup. (46 steloj), por ne-membroj de IEMW 41 r.k. (49 steloj).

La 2-a parto pri la «Sistemoj kaj provoj de Internacia Lingvo» (Volapük, Ido, Interlingue, Interlingua ktp.) fine de februaro je via dispono. Proksimume 50-paĝa. Prezo ne ankoraŭ fiksita. Ambaŭ mendeblaj ĉe IEMW.

Aperfeiĉoe seu conhecimento

A GENEROSIDADE DE CAXIAS

HUMBERTO DE CAMPOS


Derrotado a 3 de abril de 1832 pelo major Luís Alves de Lima, que saíra ao seu encontro com um corpo de polícia, o major Miguel de Frias pôs-se em fuga, procurando escapar. Lançando-se no seu encalço, estava Alves de Lima para alcançá-lo quando um adversário lhe dispara um tiro de pistola, fazendo pranchear o cavalo e permitindo, com isso, que o fugitivo desaparecesse.

Avançando de novo, é Caxias informado de que o chefe revoltoso se havia asilado em uma casa da rua do Sabão, da Cidade Nova. Apeia-se, o dono da casa franqueia-lhe a casa, que Caxias percorre. Ao fim de um corredor, havia uma porta fechada, com a chave na fechadura. O chefe legalista dá volta à chave, e abre. No centro do quarto, de pé, Miguel de Frias o esperava. Os dois heróis olham-se, mudos. Ao fim de um instante, Alves de Lima puxa a porta, e retira-se, dizendo ao dono da casa:

— Desculpe-me; não há ninguém...

No dia seguinte Miguel de Frias fugia, asilando-se nos Estados Unidos.

No próximo número daremos a tradução deste episódio, passado no dia da sedição militar, no Rio de Janeiro, com o fim de depor a Regência, e do qual foi protagonista o major Alves de Lima (depois duque de Caxias).



Kenji Ossaka — EL ORIEN-
TA FLORBEDO — Pro la ora ju-
bileo de esperantisteco — 1906-1956
— Eldono de Amo-Akademia, Ten-
mori, Ŝidami, Morijama-ŝi, Aiĉi-
-ken, Japanujo, 1956. 1 vol. 102 p.
13 x 18,5 cm. Prezo Cr\$ 90,00 en
la libroservo de B. E. L.

La estimata Aŭtoro estas eminenta
esperantisto al kiu nia movado ŝuldas
tre gravajn laborojn; li verkis elemen-
tan kaj superan gramatikojn de Espe-
ranto por japanoj, diversajn apartajn
studiojn pri prepozicioj, pronomoj, nu-
meraloj, versfarado, vortarojn, tutan bi-
bliotekon pri kaj en Esperanto. Li es-
tas 70-jarulo atestimata kaj respektata
kaj jam laboris fervore 51 jarojn por nia
afero.

Kiel antaŭparolo al la libro, li pre-
zentas la jenan «Apologion»:

*Mi estas ja inĝeniero,
neniel poeto;*

*Okaze el mia penso,
tre kruda peceto,*

Kutimis mi ion fabriki:

Da vortoj senordajn paradojn

Kolekti, mezuri, grafiki,

Marteli, irigi tra radojn,

Kaj ankaŭ tra fajron kaj premon:

Fariĝis groteska jen io,

Simila iele poemon.

Ni nomi ne povus ĝin tio,

Recenzo

Ĝi tamen «versaĵo», mi kredas,

ĉar mi meĥanike

kaj matematike,

Metrike laŭmetre procedas.

Do karaj legantoj, pardonon,

en nomo de la meĥanismo

kaj ankaŭ de l' esperantismo,

Se havus eĉ strangan ĝi sonon!

Sub sia portreto, en la komenco de
la libro, li sin prezentas:

Estas mi

bruta kaj kruda

de la Naturo infano,

sed delikat' en la koro,

ĉiam en gafa humoro,

de la homar' civitano

kaj kun fidel' kaj fervoro

ja ĝisost-Zamenhofano.

La libro instruas al ni multon pri
la japana versfarado kaj historion de
orienta poezio japana, ĉina kaj luĉa.

Granda parto de la poemoj estas
dulingvaj — japane kaj Esperante —
kaj mencias la diversajn epokojn de la
poeziaj skoloj japanaj.

La lingvoj ĉina kaj japana neniel
estas parencaj, ili tute ne similas unu
alian, sed japano povas legi la ĉinajn
ideogramojn en sia propra lingvo, ĉar
li ankaŭ uzas tiujn ideogramojn. Pri
ĉi tio li donas al ni informon en la
paĝo 32.

La libro enhavas tradukojn kaj ankaŭ originalajn poemojn, ĉiuj estas ekzotike ĉarmaj. En la lastaj paĝoj venas muziknotoj por la kantoj aperintaj en la teksto. Diversaj kliŝoj ornamas la volumon.

Ni ĉiuj havas multon interesan por lerni kaj ĝui en tiu libro.

La fakto, ke tia eminenta pensulo kaj sciencisto jam de pli ol 50 jaroj fervore laboras por Esperanto, donas al nia movado grandan moralan forton.

Zamenhof laboris por Esperanto dum 40 jaroj, sed post li aliaj grandaj homoj en Oriento kaj Okcidento, en Nordo kaj Sudo jam laboris 50, 60 kaj eĉ 70 jarojn. Esperanto ne estas infana ludo, sed serioza laboro de multaj elstaraj eminentuloj tra la mondo.

—

NORDA PRISMO — Kultura revuo redaktata de D-ro Ferenz Szilágyi — Mariedalsgatan 9, Boros, Svedujo.

Jen nova, altnivela revuo en Esperanto sub la respondeco de unu el la plej estimataj verkistoj en Esperantujo. Tuta aro da talentaj kunlaborantoj garantias ĝian riĉecon. Ĝi aperos dumonate, t.e. 6 numeroj po jaro. En tiu sama jaro aperis du novaj tre gravaj revuoj en Esperanto sub gvido de eminentuloj: la dua estas «La Nica Literatura Revuo», kies ĉefredaktoro estas Prof. G. Waringhien. Ankaŭ en ĝi la unua numero aperigis kunlaboraĵon de brazilaj samideanoj. Iom post iom niaj samlandanoj kunlaboras en la preparado de estonta mondkulturo. Ne nur kafon, ankaŭ pensojn ni jam eksportas.

Diversaj aŭtoroj. — **NI NE POVAS SILENTI!** — Eldono de Esperanto-Kenkjuŝa, 87 Matuba, Miya-tyo, Aiti-ken, Japanujo. 1953. Broŝuro 12,5 x 18 cm., 40 p. kun multaj ilustraĵoj.

En tiu ĉi kortuŝa libreto aperas raporto de diversaj kuracistoj pri la malsanoj devenantaj de la atombomboj.

Urbo atakita per atombombo fariĝas infero pli terura ol Dante Alighieri povus priskribi. Dum longa tempo post la atako aperas ankoraŭ la plej kruelaj malsanoj por mortigi homojn, kiuj ne ŝajnis difektitaj de la atako.

La propagando pri tia teruraĵo devas atingi ĉiujn homojn en la mondo por absoluta abolo de tiu monstra armilo, kiu senkompate mortigas ne nur militantojn, sed ankaŭ tute egale kaj amase infanojn, virinojn, kadukajn maljunulojn kaj bestojn.

La gloron de registaroj uzantaj tian armilon kovros la universala malamo, la abomeno de ilia propra popolo, kiam la mondo konos detale la informojn aperintajn en tiu ĉi kaj aliaj japanaj libroj. La libron oni legas kun teruraj sentoj; sed oni devas diskonigi ĝin.

I. G. B.

D.R. Duncan, Ph. D., B. Sc. — **ENGLISH-ESPERANTO CHEMICAL DICTIONARY** (*Angla-Esperanta Kemia Vortaro*) — eldono de British Esperanto Ass., Inc. 1956 — Bindita volumo, 56-paĝa — 12,5 x 19 cm. Prezo Cr\$ 250,00 en la libroservo de B.E.L.

Ĉi-tiu teknika vortaro certe riĉigos ĉiujn bibliotekojn, fakajn aŭ ne, ĉar

ĝi estas serioza kompilado de kemiaj kaj parakemiaj terminoj farita de d-ro Duncan, U. E. A. — delegito por kemio kaj «Scienco kaj Tekniko» — redaktoro. Ĝi ne estas plena kemia vortaro sed grava kontribuo al la kemia literaturo.

Li kompilis proksimume 3.000 «anglaj terminoj uzataj en teoria laboratoria kaj industria kemio», «plejparte elektitaj el la moderna scienca literaturo en Esperanto», do verko konsultinda kaj disseminda. La antaŭ-parolo angla kaj esperanta estas tre interesa kaj utila, kun komentario pri 17 novaj terminoj. Aspirator, angle = aspiratoro, Esperante, sed oni povas ankaŭ ŝiri Mariotte-botelo (botelo kun krano); «meerschaum» = merŝaŭmo, sed pli bone marŝaŭmo («écume de mer», france, «espuma do mar» portugale) aŭ ankoraŭ la minerala termino sepiolito, tutuniversala.

Pri la vortaro mem mi devas fari kelkajn rimarkojn; la plej gravajn mi diskutos. Ŝajnas al mi, kaj por aliaj kemi-fakuloj, ne taŭga la nomenklaturaro de organikaj acidoj kaj anhidrido de sen la sufikso AT, ekzemple: d-ro Duncan preferas la formojn Abieta, Aceta, Butera, k. t. p. anstataŭ Abietata, Acetata, Buterata, ktp, kiuj estas pli raciaj kaj klaraj. «Antibiotic» = antibiotiko, sed li ne citas la nomon antibiozo (Zamenhofa — formo). Por «antifoaming-agent» oni havas tri tradukojn sed preferinde estas ŝauminhibilo kaj ankaŭ antiŝaumo, kiun li ne citas. «Antichlor» estas klordetruilo, sed antikloro estas internacia nomo, ne citita. «Antifouling» = kontraŭmarkreskaĵo, sed la termino submara farbo estas pli klara kaj mallonga (france: «peinture sous-ma-

rine»). «Beaker» estas (laboratoria) glaso, sed ekzakte estas Becher-glaso (cilindroforma glaso). «Barytes» kaj «calcite» estas respektive baria spato kaj kalkspato, sed oni povas rekomendi la formojn baritino (france «barytine», portugale baritina) kaj kalcito, ambaŭ internaciaj. «Carbamide» = ureo, aŭ karbamido; «carbolic acid» = karbolo, aŭ kruda fenolo, preferinde. «Catechol» (aŭ «pyrocatechol», kemie ortodihidroksibenzeno) devas esti Esperante pirokatekolo, kaj ne kateĉolo, laŭ Duncan (pyrocatechol, france, pirocatecol, portugale, ktp). «Detergent» = sapsurogato, ŝajnas al mi nomo tre malklara; kial ne detergento, tutinternacia? Por «double decomposition» li donas: jonintersanĝo aŭ saltransiĝo, sed pli korekte ests duobla malkomponado aŭ duobla permutado, ĉar ekzistas reakcioj sen jonintersanĝo, ekzemple: $\text{CH}_3\text{OH} + \text{HCl} = \text{CH}_3\text{Cl} + \text{H}_2\text{O}$, ktp. «Glycine» aŭ «glycocoll» = aminoaceta acido aŭ ankaŭ glicino aŭ glikokolo, internaciaj formoj ne donitaj. «Mercaptan» = merkaptano, tiolo, sed ne hidrosulfido, ne-klara vorto. «Mole» = grammolekulo, kaj la mallongigo estu molo (mole, france kaj angle) «Plasticizer» = moligaĵo, aŭ ankaŭ plastikigaĵo. «Pyroligneous acid» = ligna acetacido, sed mi preferas la internacian formon: pirolignoza acido, ĉar tiu acido estas miksaĵo de substancoj. «Trona» = natria seskvikarbonato; la nomo de tiu mineralo devas esti tronao aŭ urao, universalaj terminoj. Fine «yeast» = gisto, sed termino pli ĝenerala estu gistfungeto aŭ unuĉela fungo (ekzemple, sakaromicoj, ktp).

Cícero Pimentel

(S. André, São Paulo).

BIBLIOGRAFIO

La Sankta Skribo de Amo: Tradukita de Kotohiko Macubara. Biblioteko de Tensokokjo — 22 p. Havebla ĉe la tradukinto: Tenmosi, Kozoĵi Higaŝikasugai, Aiĉiken, Japanujo, kontraŭ 2 respondkuponoj.

Amo-No-Kuseĵu, fondinto de la religio Amoisimo, estas la vera Savanto de la mondo, kiun ĝis nun oni atendis. Li mal-suprenvenis kaj nun vivas inter la homaro. Jen lia dekalogo: "1 — Ne koleru! 2 — Ne trompu! 3 — Ne kalumniu! 4 — Ne estu malĉasta! 5 — Ne estu avara! 6 — Ne estu hezitema! 7 — Ne ĉagre-niĝu! 8 — Ne lamentu! 9 — Ne surpriziĝu! 10 — Ne timu!"

Jen la kanto de l' vojaĝ! 64 p. 1957. Eld. Dansk Esperanto-Forlag (Ingemannsvej 9, Aabyoj, Danlando).

Malgranda kolekto de novaj Esperanto-kantoj; kantebla materialo por kluboj, kursoj kaj aŭtobusoj. La melodioj estas haveblaj ĉe la eldonejo.

Boro Pavloviĉ. — *Elektitaj poemoj* 16 p. 1954 — Traduko aŭtorizata de la aŭtoro. Kroata poeto.

Eld. Kroata Esperanto-Ligo — Zagreb, Jugoslavio, Amruŝeva 5 — Prezo 2 rkp.

Georgo Deŝkin — *Elektitaj Versaĵoj* — 54 p. 1957 — Serbia Esperanto-Ligo. Terazije 42, Beograd, Jugoslavio. Simplaj, melodiaj versaĵoj de malnova esperantisto, tre dediĉita al nia movado, ŝatata poeto.

La sepa libro de la serio "Nova Libro" kiun eldonas Serbia Esperanto-Ligo.

Joze Kozlevĉar — *Al la venko* — Historiaj eventoj dum 35 jaroj de Esperantomovado en Ljubljana. Eld. Esperanta Societo Ljubljana — 32 p. 1956.

Por malebliĝi la danĝeron, ke pluraj interesaj eventoj paliĝos aŭ simple perdiĝos, oni kolektis ilin en ĉi tiu interesa broŝureto.

Jarlibro 1957 — Dua parto 96 p. Universala Esperanto-Asocio. Nur por uzo de

membroj — Nepre necesa libro, por ĉiutaga, konstanta konsulto kaj uzado. Raporto de la Estraro pri la agado de UEA 1956-57.

Esperanto — Catalogue de l'Exposition Documentaire organisée du *Mundaneum* de 1-15 Septembre 1957. — Bruxelles — Editions Mundaneum 1957.

La Institut du Palais Mondial de longe interesigas al progresoj de Esperanto kaj posedas riĉan kolekton de dokumentaro: pli ol 500 verkojn kaj periodaĵojn, fotojn, afiŝojn, preseltranĉaĵojn k.t.p.

La unua katalogo enhavas la Esperantaĵojn montritajn en la Ekspozicio organizita de la Monda Palaco, en Sept. 1957.

Estas dezirinde, ke la Esperanto-grupoj, eldonistoj kaj esperantistoj helpu la pliriĉigon de tiuj kolektoj.

Angla Antologio — 1.000-1.800 j. Universala Esperanto Asocio — Rotterdam — 319 p. 1957. Forta bindo.

La redaktoroj de ĉi tiu grava verko estas W. Auld, por la poezio, kaj R. Rossetti por la prozo. Aliaj tradukintoj, krom la redaktoroj: F. Banham, C. Capp., J. Dinwoodie, A. Foote, J. Francis, G. Jervis, E. Ockey, A. Venture, G. Waringhien. Resuma skizo pri la angla literaturo 1.000-1.800, de Marjorie Boulton. Ĉi tiu libro estas la unua el la tri volumoj de planita Brita Antologio. La aliaj estos: Angla Antologio (1800-1950) kaj Skota Antologio (1000-1950).

Julian Tuwin — Poeziaĵoj — Asocio de Esperantistoj en Pollando. Eldonejo "Polonia" Varsovio, 1956. Versaĵoj propraj kaj tradukitaj, de la antaŭ ne longe mortinta granda pola poeto kaj fidela adeptulo de Esperanto.

Nuntempa Bulgario — Monata kultura revuo. Str. Levskii, Sofio, Bulgarujo ĉefredaktoro Njkolaj P. Todorov.

Liga Brasileira de Esperanto

Em 28 de Dezembro de 1957, às 16,30 horas, reuniu-se em sessão ordinária, na sede social, Praça da República, 54, 1º, a Assembléia-Geral da Liga Brasileira de Esperanto, convocada na forma dos Estatutos para a eleição da Diretoria no período de 1º de Janeiro de 1958 a 31 de Dezembro de 1961, bem como para tratar de outros assuntos de interêsse da sociedade. A sessão, que foi presidida pelo Dr. Carlos Domingues, Presidente efetivo, e secretariada pelo Sr. Francisco Ferreira da Costa Filho, Segundo Secretário, e por D. Irani Baggi de Araújo, Tesoureira, foi aberta às 16,30 horas com a presença dos delegados da quase totalidade das instituições filiadas e de grande número de outros associados.

O Secretário Sr. F. F. Costa Filho, leu a ata da sessão anterior, a qual, posta a votos, foi aprovada. A pedido do Presidente, D. Irani Baggi de Araújo leu a carta de saudação que o Prof. Ivo Lapenna, Secretário-Geral da Universal Esperanto-Asocio, dirigiu à liga pelo seu Jubileu de Ouro, comemorado no ano corrente.

Passando-se em seguida ao processo eleitoral, o Presidente, depois de ter nomeado para escrutinadores os Srs. Coronel Geraldo Pádua e Pedro de Aquino Xavier, mandou proceder à chamada dos votantes, que depositaram as suas cédulas na urna. Feita a apuração, verificou-se o seguinte resultado por unanimidade de votos. — Diretoria: Presidente — Dr. Carlos Domingues (reeleito); Vice-Presidente — Sr. Ismael Gomes Braga (reeleito); Secretário-Geral — Dr. Luís Pôrto Carreiro Neto (reeleito); Primeiro Secretário — Dr. Mário Ritter Nunes (reeleito); Segundo Secretário — Sr. Francisco Ferreira da Costa Filho (reeleito); e Tesoureira — D. Irani Baggi de Araújo (reeleita). Conselho Consultivo: Sr. Alcindo Brito (reeleito); Sr. Antônio Caetano Coutinho (reeleito); Dr. Aristóteles Juvenal de Faria Alvim (reeleito); Sr. Augusto de Castro (reeleito); Dr. Erlindo Salzano; Sr. Francisco Falcão (reeleito); Dr. Jado Ccutto Maciel (re-

eleito); Dr. João Baptista Melo e Sousa (reeleito); Sr. Octávio Viana Peixoto (reeleito); Sr. Paulino Santiago e General Wanderley Francisco Gonçalves (reeleito). Conselho Fiscal: Prof. Henerick Kocher, Capitão Jorge Campos de Oliveira e Sr. Floriano Pessoa.

Ao proclamar o resultado, o Presidente agradeceu a prova de reiterada confiança que acabava de receber e fez referência a cada um dos seus companheiros de Diretoria, com a colaboração dos quais esperava levar a bom térmo o mandato que era renovado. A Assembléia aprovou depois, unânimemente, as seguintes propostas, devidamente fundamentadas: de concessão do título de Membro Honorário ao Revmo. Fr. Dr. João Baptista Kao proponentes os Srs. Dr. Carlos Domingues e Antônio Caetano Coutinho e DD. Maria do Amaral Malheiro e Irani Baggi de Araújo; de concessão também do título de Membro Honorário aos Srs. Dr. Valdemar Lopes e Renato Pacheco Americano (proponentes os Srs. Dr. Carlos Domingues e Antônio Caetano Coutinho e D. Maria do Amaral Malheiro); de concessão do título de Membro Benfeitor ao Dr. José de Arimateia Pinto do Carmo (proponentes os Srs. Dr. Carlos Domingues, Capitão Jorge Campos de Oliveira e Antônio Caetano Coutinho); de concessão do título de Professor ao Sr. Prof. Carlos Juliano Tôrres Pastorino (proponentes os Srs. Dr. Carlos Domingues e Antônio Caetano Coutinho e D. Maria do Amaral Malheiro); de agradecimento aos Drs. Adhemar de Barros, Erlindo Salzano e Miguel Timponi pela criação do Curso Municipal de Esperanto em São Paulo (proponentes os Srs. Dr. Carlos Domingues e Antônio Coutinho e Irani Baggi de Araújo); de congratulações com o S. Paulo Esperanta Klubó e de agradecimento ao seu Presidente, Coronel Cândido Bravo, pelo revigoramento da atuação do clube (proponentes os Srs. Dr. Carlos Domingues e Antônio Caetano Coutinho e D. Irani Baggi de Araújo); de louvor ao Sr. Capitão Jorge Campos de Oliveira pelo seu magnífico trabalho de reorganização da biblioteca da Liga (proponentes D. Irani Baggi de Araújo e Srs.

BRAZILA KLUBO "ESPERANTO"

Fondita en la 29-a de Junio 1906

Sidejo: Praça da República, 54, 1.º — Rio de Janeiro

Malfermita en la labortagoj de la 8-a ĝis la 18-a — Tel.: 42-4357

Kunvenoj: sabate de la 13-a ĝis la 18-a

KUNVENOJ — Je la 1-a posttagmeze komencas aŭveni la BKE-anoj, kiuj ariĝas en amikaj grupoj por bablado. Kelkaj preferas fari Esperantajn ludojn. Iu samideanino donacis la allogan ludon *mexe-mexe*, kiun oni alfaris al Esperanto. De la 3-a kaj 30 m ĝis la 4-a oni aŭskultas la Esperanto-programon de Rádio Ministério da Educação e Cultura. Je la 4-a venas la tempo por la lecionoj, kaj la klasaj salonoj pleniĝas.

Fine, de la 5-a ĝis la 6-a akurate okazas la ĝenerala kunveno, en kiu partoprenas kelkdekoj da personoj. En ĉiu

sabato funkcias kiel gvidantoj du membroj, kaj ili klopodas fari plej agrabla la kunvenon. Tiuj gvidantoj montriĝas vere lertaj en la laboro por vekti plenan intereson. Oni deklamas poeziaĵojn, oni legas klasikajn pecojn, oni legas gazetartikolojn kun trafaj novaĵoj, oni ludas vortludojn, oni faras paroladetojn, oni kantas. Oni komplete atingas la celon, kiu estas uzi kaj aŭdi la Internacian Lingvon. La kunveno finiĝas per kantado de «La Espero» aŭ de alia kantaĵo, kaj konstatiĝas, ke la BKE-anoj fariĝas pli kaj pli kapablaj kanti ĥore. La bongusta kafo, servata dum la kunveno, estas sendube altira.

KURSOJ — Seninterrompe funkcias Esperanto-kursoj. Kiam iu kurso alproksimiĝas al la mezo, oni jam komencas alian. Tiel la kandidatoj ne devas atendi longe por lerni la lingvon. Kiam eble, BKE donas la gvidadon de kursoj al profesiaj instruistoj. La lasta estis gvidita de la sindonaj komunumaj instruistoj Iolanda Soares kaj Alaide de Sousa. La rikolto estis rimarkeinde bona.

Ĝvidas la Superan Kurson D-ro Carlos Domingues, Universitata Profesoro. Estas menciinde, ke la ĉeestado de la lernantoj en tiu duagrada Kurso restis preskaŭ senŝanĝa dum la tuta periodo. La lernantoj diligente vizitas la klason kaj laboras. Baldaŭ komençiĝos Profesora Kurso, kaj laŭ intenco de BKE ĝin partoprenos ankaŭ esperantistoj, kiuj, loĝante en la internlando,

Dr. Carlos Domingues e Antônio Caetano Coutinho); de aplaŭso ao Sr. Coronel Geraldo Pádua pela orientação que imprimiu às atividades do Brazila Klubo "Esperanto" (proponentes os Srs. Antônio Caetano Coutinho e Dr. Carlos Domingues e D. Irani Baggi de Araújo); e de louvor e aplaŭso aos jovens esperantistas que têm a seu cargo programa de rádio, a saber: Jorge Soares das Neves, Joel Vasques Manso, Luís Alberto Martins e Floriano Pessoa (proponentes os Srs. Antônio Caetano Coutinho, Dr. Carlos Domingues e D. Irani Baggi de Araújo. Em breves palavras agradeceram a homenagem os Srs. Dr. Erlindo Salzano e Jorge Soares das Neves.

D. Irani Baggi de Araújo, como Secretária da sessão, leu a notícia da inauguração, em 15 do mesmo mês de Dezembro do Monumento do Esperanto em Belo Horizonte, comunicação que foi recebida com fortes aplausos da assistência.

ne povos ĉeesti la kurson kaj sendos skribe la lecionojn.

La grava problemo pri pago aŭ senpageco de la kursoj estas solvita de BKE per la starigo de negranda kotizo, kiu enkalkulas la ricevitan libron kaj la unujaran enskribon en la Movadon kiel AM. Tiu sistemo pruviĝis multe pli taŭga, ol tute senpagaj kursoj, kiuj laŭŝajne ne estas sufiĉe konvinkaj ĉe la publiko. Aliflanke, ĉar la kotizo ne estas alta, ĝi ne malhelpas enskribon al personoj, kiuj ne povas pagi multon. Post la kursa periodo pluraj lernintoj denove enskribiĝas kiel membroj, ĉar ili restis amikoj de nia idealo. Ili estas kontentaj, ke ni uzis la bonan okazon por ilin varbi, kaj tiel ni gajnas daŭrajn kunlaborantojn.

RADIO-KURSO — De kelkaj jaroj BKE faras Esperanto-programon per Rádio Roquete-Pinto, radistacio de la Komunumo Rio de Janeiro. Ĝin gvidas kompetente S-ro Floriano Pessoa.

LEGORONDO — La membroj donacas librojn, kiuj estas pruntedonataj al la aliaj anoj por hejma legado. Estas evidentaj la bonaj rezultoj de tiu organizo por la progreso en la regado de la I.L.

MURA GAZETO — Ĉiusabate aperas sur nigra tabulo sciigojn, fotografiajn, humoraĵojn, literaturaĵojn, kiujn la membroj legas kaj komentarias kun konstanta intereso. La ĉefredaktantoj estas S-roj Magim Zubieta kaj Floriano Pessoa. Ĉiu numero, kiu daŭras unu semajnon, estas vidata kaj ŝatata de vizitantoj.

TAGMANĜO — Iam kaj iam BKE kunvenas en esperantistaj manĝoj, kiuj kunigas gaje kaj kore dekojn da samideanoj, La tagmanĝo en la 14-a de De-

cembro lasta okazis en restoracio Churrascolândia kaj havis kiel invititojn P-rojn Antônio Chediak kaj edzino, Fernando Segismundo kaj Aedo Carvoliva, Ilin salutis P-ro J. B. Melo e Sousa. La raportanto estis Kolonelo Geraldo Pádua, kaj oni akklamis kiel raportonton Kolonelo Jorge Campos de Oliveira.

INFORMADO — La Sekretariejo de BKE regule dissendas informojn al la gazetaro pri la aktivecoj de la klubo. Tiuj informoj, ekzaktaj, honestaj kaj neniam troigaj, estas bone akceptataj de la gazetoj kaj favore legataj de la publiko.

ALIĜOJ — Jam de multaj jaroj, kiam ankoraŭ ne funkciis la nuna organizo de nia Tutmonda Movado, kaj kiam la Statuto de Brazila Esperanto-Ligo ankoraŭ ne devigis la enskribon de ĉiuj membroj de la filiitaj asocioj, BKE decidis aligi al UEA ĉiujn siajn anojn. Oni prave atribuas al tiu enskribo la fakton, ke la BKE-anoj estas pli konstantaj esperantistoj, ol tiuj, kiuj ne interesiĝas pri la Internacia Movado. Efektive la membraro de BKE kreskas firme kaj senĉese tial, ke la membroj konscias pri la valoro de Esperanto kiel Internacia Lingvo. Ili scias, ke ili povas trovi kie ajn festojn, ekskursojn, balojn, ludojn, sed Esperanton ili trovos nur en siaj amataj grupoj, kie ili lernas kaj uzas nian karan lingvon por fariĝi veraj esperantistoj.

NASKIGO

La 17-an de februaro nia samideano Osvaldo Pires de Holanda gajnis sian unuan fileton Rosvaldo. Gratulon kaj bondezirojn!

GAZETARO, RADIO KAJ TV

Jorge Soares das Neves

— FD de UEA —

La brazila esperantistaro povas fieri, ĉar Esperanto firme staras kaj regule aperas en la gazetaro, aŭskultigaŝ per la radio kaj eventuale ankaŭ per la televido.

La celo de ĉi tiu nova rubriko en BRAZILA ESPERANTISTO estas ĝuste informi niajn samideaninojn kaj samideanojn. Kunlaboru kun ni sendante ĉion, kion vi vidis kaj scias koncerne Esperanton en tiuj tri fakoj.

★

Pluraj ĵurnaloj publikigas novaĵojn kaj priesperantajn artikolojn. Estas konsilinde, ke precipe la aŭtoroj de tiuj kunlaboraĵoj sendu al la Redakcio de nia organo almenaŭ la eltranĉaĵon kun la necesaj detaloj, por ke ni raportu ĉi tie.

Hodiaŭ ni enfokusigos nur revuojn, kompreneble ne-esperantistajn, kiuj pritraktas nian aferon.

REVISTA DA BOA VONTADE (Revuo Bona Volo) ĉiumonate prezentas Esperanto-rubrikon sub la respondecado de J.S.N.

SOLDADINHOS DE DEUS (Soldatetoj de Dio), ĉiumonata revuo por infanoj, prezentas ilustritan kurson sub la gvidado de Profesoro Carlos Tôrres Pastorino.

Ambaŭ revuoj apartenas al Legio de la Bona Volo, filantropa organizaĵo religie kaj politike neŭtrala, kaj aperas en 100.000 ekzempleroj.

Revuo SESINHO, ne nur por infanoj, sed ankaŭ por plenaĝuloj, estas alia grava publikaĵo ĉiumonata, apartenanta al SESI (Serviço Social de Indústria). Ĝia eldonkvanto estas . . . 100.000-ekzemplera kaj prezentas agrablajn lecionojn kaj novaĵojn, pri kiuj respondecas F-ino Irani Baggi de Araujo, kasistino de Brazila Esperanto-Ligo.

Alia famkonata revuo ne-esperantista estas MANCHETE (ĉiusemajna), kiu en sia numero 321 de junio aperigis interesan paĝon de la brazila kronikisto Rubem Braga favore priskribanta la Esperanto-programon de Rádio Mundial.

En Brazilo nia Movado venkas ankaŭ per la radio. Sufiĉas diri, ke en Rio de Janeiro tri radiostacioj regule disaŭdigas la Internacian Lingvon.

El tiuj du estas oficialaj:

RÁDIO MINISTÉRIO DA EDUCAÇÃO E CULTURA (PRA-2) — en 375 m kaj 25.10 m — prezentas ĉiusabate de la 15,30 ĝis la 16 priesperantajn informojn, pri kiuj respondecas samideanoj Joel Manso kaj Luís Alberto Martins, sub la aŭspicio de Brazila Esperanto-Ligo. Estas interese rimarki, ke estas alia samideano nomata Luís Alberto Martins, kiu ankaŭ prezentas perradian programon, sed sen rilato kun nia Movado.

RÁDIO ROQUETE PINTO (PRD-5) — en 214 m — prezentas nur kurson ĉiusabate de la 19,00 ĝis la 19,30 sub la gvidado de samideano Floriano Pessoa.

(Daŭrigo sur paĝo 23)

RIDU, NI PETAS

Raportisto — Mi havigis al ni liston de ĉiuj ŝtelistoj en la lando.

Direktoro — Bonege, bonege! Sed kiel vi havigis la liston?

Raportisto — Mi ĝin ŝtelis.

Unua akto

Li — Ĉu vi amas min?

Ŝi — Mi adoras vin.

Dua akto

Li — Ĉu vi amas min?

Ŝi — Mi adoras vin.

Tria akto

Li — Ĉu vi amas min?

Ŝi — Mi adoras vin.

Roluloj

Li, unu ĉiun akton.

Ŝi, la sama en la tri aktoj.

— Mi neniam plu drinkos.

— Kial?

— Ĉar, hieraŭ kiam mi eniris hejmen mi vidis mian bopatrinojn duobla.

Fama direktoro de televido inspektas la laborojn de siaj funkciuloj. Ĉiuj laborregas. Sed en anguleto juna viro, kiu nenion faras, sidas kun trankvila mieno.

La magnato tuj vidas la junulon, kaj rimarkante ke li ja nenion faras, alproksimiĝas al li kaj kun rigida mieno demandas:

— Kiom vi gajnas ĉiumonate?

— Mi? demandas la junulo iom surprizita. Dek mil kruzejrojn...

La magnato elpoŝigas la monujon, elprenas dek mil kruzejrojn, liveras ilin al la junulo kaj proteste eksplodas:

— Jen unu monatpago plie, kaj de nun vi estas maldungita. Mi ne toleras mallaboremulojn.

Nenion dirante, la junulo ricevas la monon kaj foriras. La mastro sin turnas al unu el siaj altrangaj funkciuloj, kaj diras:

— Mi tre dezirus scii kiu dungis tie ĉi tiun sentaŭgulon.

— Neniun, klarigas la alia. Tiu junulo venis tie ĉi nur por liveri leteron.

Trad. L. A. M.

(Gazetaro... de paĝo 22)

RADIO MUNDIAL (PRA-3), en 860 kilocikloj, estas la unua komerca radiostacio, kiu grandskale interesiĝas pri nia lingvo. De lundo ĝis sabato de la 6,00 ĝis la 6,30 ĝi prezentas la programon «VAMOS APRENDER ESPERANTO?» sub la aŭspicio de LVB kaj sub la gvidado de la aŭtoro de ĉi tiu rubriko.

Estus nenecese konsili al ĉiu samideano kaj samideano aŭskulti kaj skribi al la supraj programoj. Memoru la averton de la UEA-organo: «La esperantistoj havas la disaŭdigojn, kiujn ili meritas».

★

La 14-an de februaro B.E.L. estis invitita partopreni la programon «Quero saber mais» de la *Televidostacio Tupi*, por respondi al demandoj pri Esperanto formulitaj de unu televidanto. D-ro Carlos Domingues, Prezidanto de B.E.L., komisiis al ĉi tiu fakdelegito la taskon.

Tamen ĉirkaŭ tri monatoj poste en la sama televidostacio iu malbone informita persono redaktis anoncon, dirante ke Esperanto ne plu ekzistas. Oni asertis tion por diri, ke Vermouth Cinzano kontraŭe estas internacie konata. Kia eraro! sufiĉas diri, ke eĉ Cinzano utiligas Esperanton por fari tutpaĝan propagandon en la Jarlibro de UEA.

Profesoro J.B. Mello e Souza en la nomo de la ĉefurba esperantistaro skribis viglan leteron, kiu tre efikis. Oni ĉesis mensogi.

ANONCETOJ

Mi deziras korespondi kun amikoj kaj amikinoj de Brazilo kaj interŝanĝi poŝtmarkojn. Fraŭlino Denise Corre, 20 Rue des Prairies, Vichy (Allier), Francujo.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildkartojn kun la tuta mondo. P.M. Penevski, kv. Cerno Konevo, Dimitrovgrad, Bulgarujo.

Deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun brazilaj gesamideanoj. Adreso: Jaan Laarman, Kastani 93-1, Tartu, Estonia SSR, USSR.

SCIENCAJ STUDIOJ

**bazitaj sur originalaj esploroj kaj
sub redakto de
PAUL NEERGAARD
Preço Cr\$ 400,00**

NOVIDADE!

GRAND DICTIONNAIRE ESPERANTO-FRANÇAIS

de

G. WARINGHIEN

Professor Agregé da Universidade
Director da Secção «Generala Vortaro»
da Academia de Esperanto

Um volume de 368 páginas 14 x 19,5
encadernado em tela, com capa, de
matéria plástica, transparente

A mais recente edição da Librairie
Centrale Esperantiste

Preço Cr\$ 750,00

LIBROSERVO DE BEL

Plej fama brazila verkisto nun tradukita en la Internacian Ligvon!
Jus aperis en la libroserio memoriga pri la Ora Jubileo de Brazila
Esperanto-Ligo

TEATRO

de MACHADO DE ASSIS

Eldono en la 50-a jaro de la morto de la aŭtoro

Kvar komedioj tradukitaj en Esperanton

La Protokolo, trad. de Manueu Aveleza de Sousa

Ne konsultu kuraciston..., trad. de António Caetano Coutinho

Preskaŭ Ministro, trad. de Henerik Kocher

Leciono pri Botaniko, trad. de Débora do Amaral Malheiro

Aĉetu por vi kaj por donaco al amiko kaj al biblioteko de via urbo!

1 vol. 160 paĝoj — Cr\$ 80,00

LIBROSERVO DE BEL